

Babiladaj rondoĵoj

... okazos je la 19-a, vendrede

la 11-an de oktobro

ĉe François Randin

Vallombreuse 14, Lausanne

tél. 076 411 14 55



la 25-an de oktobro

ĉe Gilbert Darbellay

ch. de l'Orme 6, Morrens

tél. 079 315 14 13



la 8-an de novembro

ĉe M.-A. et K. Sunier

Av. des Alpes 150, Montreux

Tél. 021 961 38 56

<http://doodle.com/teum7w3gz46vdyc6>

Proverbo

Eĉ guto malgranda,

konstante frapante,

traboras la monton granitan



Ni ankoraŭ multe dankas Franciskon pro la belegaj filmoj, kiujn li projekciis dum la pasinta kunsido. Gratulon pro la kvalito de la filmo pri Islando !

Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22

+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28

esperanto@citycable.ch * www.esperanto.ch/Lausanne

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Bühlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte

Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: Francisko Randin *

076 411 14 55 - Kasistino.: Françoise Pétermann *079 517 44 43

Redaktoro de la informilo : Knud Sunier *021 961 38 56

Informilo

Oktabro 2013 - n° 8

Demandoj pri gramatikaĵoj kaj pri aliaĵoj nialingvaj

lunde, la 7-an de oktobro 2013

kiel kutime ... je la 20-a, ĉe la unua etaĝo
de la laŭzana stacidoma bufedo

Lunde la 4-an de novembro

Decidota

Sabate la 14-an de decembro


Zamenhofa Festo

(programo aperos en la venonta informilo)

2014

Lunde la 6-an de januaro

Decidota



Lunde la 5-an de februaro

Ĝenerala asembleo

Laŭzana Esperanto - Societo

Turisma semajno en Greziljono

de la 5a ĝis la 15a de julio 2013

Parolante kaj rigardante prospekton pri Greziljono ni (Charlotte, Marie-Antoinette, Viktor kaj Knud) decidis partopreni la turisman semajnon. Tiel ni povas kunligi Esperanton kaj turismon en tiu fama regiono.



Frumatene vendrede la 5-an de julio ni forveturis direkte al Francio. Oni diras, ke la vetero estas bela, kiam la anĝeloj vojaĝas. Ni eble ne estas anĝeloj, sed post longa malbela kaj malvarma periodo estis bela somera vetero. Post 475 kilometroj ni atingis Bourges, kiu mirigis nin per sia giganta katedralo kaj la Palaco de Jacques Cœur, kiu estis la fama financa superintendantato de la reĝo Karlo la 7-a. Post la vespermanĝo sur agrabla placo ni malkovris la urbon kun belaj lumigitaj stratoj. Ni dormis bone en agrabla vinberista domo kun bela parko.

Sekvan matenon ni vizitis la kamparon de la fama verkistino George Sand. Kun granda plezuro ni vizitis ŝian ĝardenon, kapelon kaj tombolon. Tiu kamparo nomiĝas « le Berry », el tiu tero ŝi trovis la esencon de siaj romanoj. Ŝi estis mirinda virino, kiu tra siaj libroj montris, ke la virinoj povas egali la virojn.

Por la sekva tago restis vojaĝo 200-kilometra tra belaj kamparoj kaj arbaroj. Tra multe da stratetoj ni atingis nian celon je la 6-a vespere: ni estis en Esperantujo. La Kastelo

mirinde situas en granda parko. Ni ricevis niajn ĉambrojn kun bela vido sur la marĉeto kaj arbaro. Ni interkonatiĝis kun la aliaj partoprenantoj. Tuj ni sentis nin senĝenaj kaj libermovaj kun germanino, iranano, rusoj, francoj, tuj la magio de Esperanto funkciis. Jannik, la organizantino, prezentis al ni la venontan programon. Ni uzos buseton por 8 personoj, kiun kondukos Katerina, kiu estos nia ĉiĉerono. La aliaj 4 sekvos en Jannik-aŭtomobilo. Post tiu longa kaj laciga tago ni dormis sur molaj matracoj aŭskultante la

kanton de la ranoj.

Dimanĉe la 7-an de julio matene ni malkovris la ĉirkaŭaĵon de la kastelo kaj admiris la grandan ŝtonon de la parko. Tiu ŝtono estas menhireto, kiu certe staras ekde tre longe ĉi-tie, multe pli longe ol la kastelo, kaj sur kiu estas gravuritaj kelkaj vortoj pri Esperanto. Post la tagmanĝo ni vizitis trogloditan vilaĝon, kie ni malkovris kaŝitajn vivlokojn en la kalkaj rokoj, preĝejon, kuirejon, vestejon, brutarejon, ktp; nenio mankis, ĉar la kamparanoj vivis kiel ni. Sur la strato en Brissac, ni rigardis de ekstere la kastelon, kiu estas la plej alta en Francio kun 7 etaĝoj kaj 204 ĉambroj, bela, stranga konstruaĵo el la 15-a jarcento kun mezepokaj turoj kaj nova fasado el la 17-a jarcento.

Ankoraŭ kelkaj kilometroj por enŝipiĝi kaj malkovri la riveregon Luaron. Dum 2 horoj ni admiris trankvile la riverbordojn, la insulojn, la birdojn, kastorojn kaj ardeojn. Ĉiam Katerina bone tradukis ĉion kaj ĉiuj ĝuis tiun belan tagon.

(Verkis Karlota - daŭrigo en la venonta informilo)